


40-a jaro. Nro 91-a. 1-a semestro 2013



# VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**Forpasis nia prezidento  
Hugo Chávez Frías**



# Enhavtabelo

**VENEZUELA STELO**  
Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio**VENEZUELA STELO**

Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.

Telefonnumero: 58-0212.662.9224

[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)**Estraranoj:****Prezidanto:** Johano Negrete.  
**Vic-Prezidanto:** Juan Miranda.  
**Sekretario:** Ricardo Coutinho.  
**Kasistino:** Elizabeth Miranda.**Aldelegitoj:**Esteban Mosonyi  
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).  
Nancy Aquino (Eldonado).  
Aquiles Rivas (Biblioteko).  
Silvana Messori (Instruado).**Redakcia Responsulo:**

Ricardo Coutinho.

**Kunlaborantoj:**Liba Gabalda.  
Johano Negrete.  
Ramón Morales Castel.  
Thairon Martínez.**Grafikisto:** Ramón Morales Castel.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

Venezuela Esperanto-Asocio

**Letero de la redakciisto 3-a****Diabloj Dancantaj de Corpus Christi 3-a****Vizito de la geedzoj Katy kaj Andrés Turrisi al VEA**  
Ricardo Coutinho 4-a**Rubén Darío Limardo 4-a****Foririnte Chávez, li rompis korojn / Johano Negrete 5-a****Se neniu Dio nin aŭdas / Giovanni Campus 8-a****Franca Esperanto-Kulturdomo invitas vin**  
Bert Schumann 10-a**79-a Itala Kongreso de Esperanto**  
Liba kaj Floreal Gabalda 11-a**Vivanta Lingvo 5: Demando-signo "ĉ"**  
Johano Negrete 12-a**Vizito de Rumanio kun krozado tra la Danuba Delto**  
Liba Gabalda 14-a**Forpasoj 17-a****La Idealo de Flor / José Rafael Pocaterra 18-a****Kial ni kantas / Mario Benedetti 25-a****La Insulo de Nemo (IX) / Johano Negrete 26-a****20-a Internacia Esperanto-Semajno**  
Liba Gabalda 28-a**La kvindek jariĝo de Doktoro Kiu ("Dr. Who")**  
Pedro Jaimez 30-a**"Tie ĉi li trapasis, kunulo" / Thairon Martínez 32-a****La 65-a IFEF-Kongreso**  
Liba Gabalda 33-a**Novjara mesaĝo: Tamen antaŭen!**  
Johano Negrete LASTA





## Letero de la redakciisto

Saluton al ĉiuj niaj estimataj gelegantoj.

Dum la fino de la jaro 2012 ĝis la duono de 2013 de tiu jaro oni povas rakonti pri multaj aferoj: vizito de nia estimata amiko Andrés Turrisi post 6 jaroj en Italujo, malsano kaj morto de nia landa prezidanto Hugo Chávez, forpaso niaj karaj samideanoj kaj eksmembroj de nia organizaĵo Maritza Graziani kaj Brigitte Clarac kiuj laboris dum almenaŭ dek jaroj en nia organizaĵo kaj donis al ĝi sian amon kaj dediĉon. Ni havis ankaŭ bonajn okazintaĵojn kiel la membriĝo de la dokumentalisto Thairon Martínez kaj la kuba

kantisto Raciél Labrada, nia Zamenhofa Vespero en nia oficejo, novaj mensaĝoatakoj de la sinjoro Pedro Jaimez, kiu bonŝance acceptis sendi al ni artikolon kiu aperas en tiu nova versio. Je la 24<sup>a</sup> de aprilo nia prezidanto Johano Negrete prelegis en la esperanta lingvo “Internacia Lingvo kaj Libero”.

Mi dankas al vi pro via fideleco kaj mi esperas ke vi ĝuu plenplene nian laboron.

**Ricardo Coutinho**  
Redakcia Responsulo

## Diabloj Dancantaj de la Corpus Christi

Dum la 7-a Kunveno de la Komisiono Interŝtata por la Gvido de la Kulturaj Heredaj Ne-materiaj Havaĵoj de la UNESKO (Decembro, 2012). Ĝi decidis ke Diabloj Dancantaj de la Corpus Christi eniru en la listo de kultura hereda ne-materia havaĵo de la homaro.

Tiu kulturaĵo konsistas de 11 kunfrataroj tra Venezuelo kiuj kultas al la Sankta Sakramento dum la sankta ĵaŭdo.

Ĝi aperis dum la 18<sup>a</sup> jarcento, estas la malvenko de la Diabloj fronte al Sankta Sakramento, la bono venkas al malbono. Krom la evidentaj kristanaj eroj, oni povus menciigi ke tiu danco enhavas indiĝenajn kaj afrikodevenajn kontribuojn.

La kunfrataroj estas: de San Francisco de Yare en Ŝtato Miranda, Turiamo, Cata, Ocumare de la Costa, Cuyagua kaj Chuao en la Ŝtato Aragua, de San Millán kaj Patanemo en la Ŝtato Carabobo, de Naiguatá en la Ŝtato Vargas, de San Rafael de Orituco en la Ŝtato Guárico kaj de Tinaquillo en Ŝtato Cojedes. Ĉiuj el ili montris diversajn kaj malsimilajn dancojn, multkolorajn vestaĵojn kaj maskoj. ★



Fonto: AVN (Agentejo Venezuela de Noticoj)



Masko de Diabloj Dancantaj de Yare




## Vizito de la geedzoj Katy kaj Andrés Turrisi al Venezuela Esperanto-Asocio Raportas: Ricardo Coutinho

La geedzoj alvenis al Karakaso je la monato de novembro 2012 por viziti sian filon, kuraciston kaj eĉ al la esperantomovado. Tiu ĉi 6<sup>a</sup> de Februaro alvenis al la asocio kaj parolis pri sia nova vivo en Italujo. Oni donacis al ili unu ekzempleron de libro La Parfuma Jaguaro de Teófilo Tortolero kaj kelkajn ekzemplerojn de “Eta Selektajo de Verkoj de Simón Bolívar”, tiu lasta Turrisi mem estas unu el la tradukintoj. Ni tagmanĝis kaj babilis kun nia prezidanto Johano Negrete kaj Thairon Martínez.

Dum 33 jaroj Andrés Turrisi estis unu el la plej fidelaj de nia organizaĵo. Fakte li estis: prezidanto, vicprezidanto, sekretario, instruisto, verkisto, redaktisto de Venezuela Stelo dum pli ol 20 jaroj. ★



## Rubén Darío Limardo



**Rubén Darío Limardo Gascón**, naskiĝis en la urbo Bolívar en la Ŝtato Bolívar, Venezuelo, je la 3<sup>a</sup> de aŭgusto 1985. Li estas skermisto kaj gajnis la oran olimpan medalon en Londono 2012. Aldone al tio, li gajnis diversajn tutamerikajn medalojn, kiam li partoprenis en la Ludoj Tutamerikaj de Santo Domingo 2003, Rio de Ĵanejro 2007, Gvadalaharo 2011, Ludoj Olimpaj de Pekino 2008 kaj Londono 2012. Dum tiu ĉi lasta evento li gajnis oran medalon. Li estas frato de la skermisto Francisco Limardo. ★







## Foririnte Chávez, li rompis korojn

Johano Negrete. Elhispanigis Thairon Martínez

La morto de la Prezidento Hugo Chávez dum la vespero de la 5a de marto 2013 estis la plej malfeliĉa novaĵo de la lastaj tagoj kaj opakigis ĉiujn aliajn novaĵojn ene kaj fore de Venezuelo. La telefonlineoj kaj la sociaj virtualretoj tuje kolapsis ĉe la lando. La tuta lando eksteremis kaj paralizigis. Nacia kaj internacia funebro -10 tagojn en Venezuelo estiĝis, ĉar sendepende de la politikaj preferoj kiujn vi, defendus, ĉi tie ĉe Venezuelo mortis eksterordinara ŝtata homo, kiun ni prijuĝas, por diri breve, eksterordinara homo, historia gvidanto de popolo kiun li transcendis per sia agado kaj pasis esti akceptita kiel latinamerika kaj monda gvidanto.

Kiel ĉiu revoluciisto kiu konstruas grandcelan kreaĵon, li havis la amon de milionoj da sekvantoj, en Venezuelo kaj la mondo, sed samtempe ankaŭ multajn profundajn malamojn, antipatiojn fabrikatajn de propagandaj aparatoj el la amaskomunika monda diktatoreco, per elcerbumadoj de profesiaj opiniistoj, kies ununura tasko estis kaj estas malkonstrui la diversajn trajtojn de la vivo de tiu viro. Li estis ĉiam en la vido de siaj malamikoj ĉu por nuligi lin morale ĉu eĉ fizike. Chávez estis la homo plej ofendita en ĉi deko de la XXI-a jarcento, pro esti kiu ekigis tion kion li nomis “la socialismo de la XXI-a jarcento” (kristana, bolivariisma, humanisma kaj solidara kun la nacioj de nia Ameriko), kiam jam neniu vetis al socialismo. Tiel en la internacia spaco, Chávez remetis socialismon en la palestron.

Elstaras grandege lia humana kvalito kaj lia servemo al la malriĉuloj mondaj. Lian tutan regadagadon estus maleble resumi per malmultaj



vortoj, tial ke li impulsis Venezuelon tra vojoj progresaj, ĝin igis pli sendependa kaj suverena, certigis la internan pacon malgraŭ la obstakloj kiujn starigadis la opoziciuloj kontraŭ lia regado, kaj pri internacia politiko, li alfrontis la nordamerikan imperion, ne propravole, sed pro la arogantaj kaj superregantaj politikoj de la imperio, kiu kromdire, ludis ĉiam puĉon kontraŭ li per konspiroj, financado al opoziciaj partioj kaj amaskomunikaj entreprenoj, kaj atakoj en oficialaj deklaracioj kaj surtute per la kunlaboro de niaj amaskomunikiloj destinitaj krei grandan malstabilecon en la lando. Ekzemple, la ŝtatrenverson je la 11a de aprilo 2002 oni priskribis kiel la unuan “elamaskomunikan puĉon” historie, pro esti direktita de amaskomunikaj entreprenoj, kreintaj opinimatricon laŭ kiu ni vivis en diktatoreco, kaj diktatoro Chávez estis ambicia viro, murdisto kaj korupta, kiam li estis ĉio kontraŭa al tia opinia matrico. La vera diktatoreco kiu aperis sceneje tiam estis la “amaskomunika diktatoreco” nacia kaj internacia. Bonŝance, la plejmultoj el la venezuela popolo sciis malfidi je la amaskomunikiloj, kaj kompreni la propran rolon renversi la mondon.

La fakto ke malsukcesis la ŝtatrenverso de la 11a de aprilo 2002, kaj ankaŭ la dumonata “petrola puĉo” de PDVSA (La ŝtata petrolfirmao de Venezuelo N.d.T.) (2002-2003) kune kun la blokado de la venezuelaj havenoj, kaj la ekonomia puĉo per strikoj kaj senprovizigoj fare de entreprenuloj, kaj la puĉo per kapitalfuĝoj, kaj ankaŭ la “guarimbas” aŭ strataj amasperturboj en urbanizaĵoj de alt-meza klaso de la



**Foririnte Chávez, li rompis korojn** **Johano Negrete. Elhispanigis Thairon Martínez**

orienta Karakaso, ĉio ĉi fortigis multe la revolucieman faktoron de la registaro de Chávez; ĉar tiu komencis kiel reformisma registaro, kaj post tiom da atakoj el la venezuela dekstraro, Chávez prenis la politikan iniciatemon post lia venko en la senvalidiga referendumo je 2004. Niakonstitucie ekzistas la trajto ke ajna posteno el popola baloto povas esti senvalidigita per referendumo, kondiĉe ke periodmezo estu plenumita.

Oni povas aldoni ke la puĉon de la 11a de aprilo 2002, la usona registaro ne nur apogis per financado, sed planis ĝin kun kelkaj venezuelaj armeanoj kaj, tiutempe, proksimigis ŝipojn kaj aviadilojn al niaj marbordoj, ili transpasis nian spacon danke al la helpo de la puĉistoj. Estas kredeble ke ĉiuj planeroj de tiu puĉo organiziĝis ĉe Vaŝingtono, dum la regado de la pereiga Prezidento George Bush (ido), kun-aŭtoro de pluraj militoj. Tial la chavezismo prenis la kontraŭ-imperiisman vojon, kaj de jaro antaŭ ol sia balota venko kiel reelektita Prezidento en 2006, Chávez

kampanjis por transiro al socialismo, tial ke nur en socialismo –li estis konvinkita– oni povas atingi societeton socie justan kaj la veran egalecan demokration.

Chávez estis grandeca humanisto, kaj tia lin prijuĝas la grandaj plejmultoj el la popolo, ĉar li sciis doni al la prezidenta ofico stilon tiom specialan de proksimeco kaj senĉesa

kontakto kun la popolo, speciale kun la humiluloj kaj malriĉuloj, maljunuloj kaj infanoj, malsanuloj kaj invalidoj, laboristoj, studantoj kaj profesiuloj, kun la instruistoj kaj soldatoj, la artistoj kaj skribistoj, sportistoj kaj speciale la virinoj. Al ĉiuj ĉi personoj li plibonigis videble ilian vivo-kvaliton. Chávez eligis Venezuelon el kronika krizo, suferita dum la registaroj de la “Kvara Respubliko” (1958-1998), ege difektitaj jam pro la korupteco kaj la liveremo al la usona imperio. Chávez direktis Venezuelon al vojo de progreso kaj aŭtonomeco, kiu alportis prosperon por ĉiuj socitavoloj, kvankam speciale por la malriĉuloj kaj la grandaj plejmultoj.

Aliflanke, li inaŭguris registilon tiel originalan, tiel personan, korinklinan kaj atenteman al la bezonoj



de la popolo, kie la ĝenerala publiko lin perceptis kiel amikon, fraton, patron, estaĵon senditan de Dio, savanton de siaj problemoj kaj fine, iun similan al ĉiu alia. Ne estas politikisto simila al li en la venezuela historio. Tiu stilo eĉ sonis iom strange, nekomprenible ekde la unua regjaro, kio alvenigis al li multajn kritikojn sence ke tiel ne devus kondukti ajna Prezidento. Sed li estis prezidento humildevena,



kvankam klera militisto, nesatigebla leganto, teoristo, sed surtute agema homo kaj kuraĝa defendanto de la malriĉuloj. La potenculoj el la Tero ne pardonis ke li povis venki ilin tiom da fojojn tiel konstitucie kaj demokratie. Malsame ol Salvador Allende en Ĉilio, Chávez povis kontroli la dekstremajn sovaĝbestojn el la

kazernoj, kaj superante danĝerojn, li proponis en 2006 demokratan vojon al socialismo de la XXI-a jarcento, sen fali venkita.

Mi volas esprimi personajn impresojn kiuj gravuriĝis en mia koro tiun tagon 6a de marto 2013, kiam lia kadavro estis portata tra la urbo Karakaso al lia funebra loko. Mi rigardadis tiun procesion malrapidegan kun la ĉerkon kaj kiel surstrate kunamasiĝis granda nekredebla amaso da popolo –malfacile kalkuli kiom da personoj– sed ĝi estis maro da popolo, ŝajne milionoj. Multaj ploradis, multaj volis tuŝi la ĉerkon, antaŭenirante malrapidege. La popolo ŝutiĝis ankaŭ ĉe la fenestroj, balkonoj kaj terasoj de konstruaĵoj en varma tago. La publika doloro estis tiel videbla, ke ni kiuj vidis la okazaĵon per televido ne





## Foririnte Chávez, li rompis korojn Johano Negrete. Elhispanigis Thairon Martínez

povis eviti la larmojn. La silento regis. Ŝajnis ke la tuta urbo amasiĝis sur la stratoj por adiaŭi sian Majoron-Prezidenton Hugo Chávez Frías, 58-jara, kiu en la balota batalo je la 7a de oktobro 2012 atingis tiel brilan triumfon post preskaŭ 14 jaroj en la Prezidenteco. Li iris for de tiu ĉi mondo, politike nevenkita aŭ laca pro venki tiom da bataloj. Dume liaj tradiciaj malamikoj –la burĝaro kaj partioj el la malnova societo –malŝatis lin ĉiam, dum la monatoj de lia malsano kaj eĉ post lia morto.

Sed baldaŭ la figuro de Chávez gigantiĝus eĉ plie, ĉar el la tri tagoj funebraj dekretitaj ĉe “La Domo de la Bluaj Songoj” (Armea Akademio), kie la longegaj vicoj el civitanoj kiuj deziris adiaŭi lin, ne ĉesis tage aŭ nokte, iĝis necese plidaŭrigi la funebrojn sep tagojn pli. Oni ne troigas kiam diras ke milionoj da venezuelanoj venintaj el ĉiuj anguloj de la lando, restis longajn horojn envice por vidi, ĵuri lojalecon, fari promesojn kaj eĉ kanti al li. Kiel politikistoj kiuj estis amataj kaj respektataj de siaj popoloj, alvenas al mia menso la kazoj de Nasser kaj Ghandi, alte kortuŝaj en la fina adiaŭo de la homamasoj. Mi kredas ke estas tre probable, ke al Chávez adiaŭis homamaso de du milionoj da personoj dum la publika funebro. Maleble

estas kaŝi sunon per fingro, pro kio la internacia amaskomunika diktatoreco devis agnoski implicate la gravon aŭ grandecon de Chávez, mezuritan per la fervoro de lia popolo. Chávez foriris estiĝinta milionoj. De tiam mi sciis ke je la venontaj balotoj por Prezidento de Venezuelo, la opozicio kapitalisma, novliberalisma, financata, kuratorata, direktata kaj submetita de Usono, jam estis malvenkita.

Aklamita, amita de venezuelanoj kaj aliaj mondaj popoloj, kelkfoje adorita per maniero pli emocia ol racia (emocio ankaŭ ludas fundamentan rolon en politiko), malamita de la mondaj potencoj kaj la entreprenaj korporacioj kiuj kontraŭis lin pro “ne malsovaĝigebla”, klopodintaj malaperigi lin. Chávez ĉefe estis homo bonkora kaj ŝtalkarktera, du kvalitoj malfacile akordigeblaj. De malriĉa popolo kaj tre humila familio venis Chávez skaladi la suprojn politikajn de la mondo, kaj en tiu vojirado li sukcesis konservi sin morale integra. Tial, pri la grandaj homoj kiel li oni povas diri la plej simplajn vortojn, kiujn Hamlet diris pri sia patro: **“Li estis homo en ĉio kaj por ĉio, kiel mi ne esperas trovi alian similan”**. ☆



**Se neni Dio nin aŭdas**  
**Giovanni Campus****Se nessun Dio ci ascolta**

Ascoltatemi. Io credo  
che non abbiamo ancora superato  
una prova più alta  
di coraggio. L'estrema solitudine,  
l'ultimo vuoto, il nulla  
che avvolge la fatica del poeta.

Perché se nessun Dio  
sopra le nubi ascolta  
queste parole umane, la tua voce  
ricade nell'inutile silenzio.

Non rimane che un gioco  
di sillabe, ogni ritmo  
è sterile richiamo che accarezza  
e illude sorridente i morituri...  
Nulla pesano i versi tormentati  
dei poeti, non contano  
nulla davanti a Lui,  
l'Assente.

Tutte le prove, le dimostrazioni  
di quella sua famosa, incomprensibile,  
divina provvidenza fatalmente  
le insidia la falange  
dei tarli roditori

del dubbio. Se c'è Auschwitz, non c'è Dio:  
l'abbiamo udito tutti questo grido!

Forse, allora, dobbiamo rassegnarci.  
Se Dio non c'è... dunque nessuno, mai,  
nei deserti di gelo interminato  
fra le galassie, muto, invalicabile  
silenzio eterno, udiva

l'Adagio della Nona, la Canzone  
del Salice, i corali appassionati  
di Bach. Negli alti cieli  
dove esplodono immense, solitarie  
Supernovae nei giorni del Dies Irae,  
nessuno intese l'alta fantasia  
di Dante, la dolente

dolcezza di Virgilio, la sublime  
semplicità di Omero. E il Budda, e Cristo,  
e Maometto e Mosè furono eroi  
generosi e illusi. Ogni preghiera,  
ogni verso, ogni musica  
è solamente vano  
gioco, polvere, scherno...

Se Dio muore per sempre, quale artista

**Se neni Dio nin aŭdas**

Aŭskultu min. Mi kredas  
ke ankoraŭ ni ne estas superintaj  
pli malfacilan provon  
de kuraĝo: la ekstrema solestado,  
la vakuo lasta, la neni'  
kiu envolvas la poetan penon.

Ĉar se neni Dio  
super la nuboj aŭdas  
ĉi tiujn vortojn homajn, via voĉo  
en la silenton vanan ree falas.

Nur restas iu ludo  
silaba, ĉiu ritmo  
estas sterila logo kiu karesas  
kaj iluzias plaĉe la mortontojn...  
Neniom pezas l' angorplenaj versoj  
de la poetoj, gravas  
neniom antaŭ Li,  
la Neĉeestant'.

Ĉiujn pruvojn, kaj ĉiujn demonstradojn  
de tiu fama Lia, nekomprenebla,  
dieca providenco laŭdestine  
insidas la falango  
de la ronĝantaj vermoj

de l' dubo. Se ekzistas Auschwitz, Dio ne:  
Ni ĉiuj aŭdis tiun ĉi kriegon!

Do, eble, devas ni rezignacii.  
Se Di' ne estas... neni do, neniom,  
en la dezertoj sideraj de glaci'  
senfina, muta, eterneca silento  
netrairebla, aŭdis

l' Adaĝon de la Naŭa, la Kanzonon  
de l' Saliko, la pasiajn ĥorkantojn  
de Bach. Altaĉiele,

kie eksplodas grandegaj kaj solecaj  
supernovoj tempe de la juĝotag',  
neniu kaptis l' altan fantazion  
de Danto, la doloran

dolĉecon Virgilian, la subliman  
simplecon de Homer'. Kaj Budho, Kristo,  
Mahometo, Moseo estis herooj  
sindediĉaj, songantaj. Ĉiu preĝo,  
ĉiu vers', ĉiu muzik'  
estas ne pli ol vana  
ludo, polvo, moko...

Se Di' por ĉiam mortas, kiu artisto





## Se neni Dio nin aŭdas Giovanni Campus

mi consola? Ogni canto  
tace, non dà speranza la Pietà  
scolpita da un divino Michelangelo  
venticinquenne... (forse solamente  
i suoi Prigioni, chiusi dentro il marmo,  
mi ascoltano, in silenzio).

Se nessun Dio ci ascolta  
sopra le nubi, un volo disperato  
sono i grandi poemi, e gli infiniti  
poeti di ogni tempo  
affollano, esaltati, interminabili  
pianure, dove sembra  
che parlino da soli... Non c'è nulla  
più da scrivere, ormai. Taci, poeta.

Puoi solamente dire:  
“Se Dio non c'è, è colpevole: la colpa  
più grave, non esistere”.

Eppure, insopprimibile, rinasce,  
nel profondo di te, l'altra risposta.  
Anche se Dio non c'è, quale conforto  
più nobile di un gesto

d'amore fra le nostre solitudini?

Ricordate il sorriso luminoso  
di Charlot che ritrova la fioraia  
che una volta era cieca, fra le luci  
della città? Perfetta

letizia, solo paga di sé stessa.

Gesto d'amore sempre è la poesia,  
mistero irriducibile che vive

dentro il cuore dell'uomo, orma segreta  
di quel Dio che cerchiamo, prova certa del suo  
passaggio fra di noi. Resisti,

dunque, poeta. Come il vecchio cane

Argo, caro ad Ulisse, logorato  
dagli anni, emarginato dai potenti,  
rimani ancora, tu, resta in ascolto  
di quella voce, di quel passo. Forse  
quello che attendi, il tuo signore, forse  
è vicino. Poeta, non arrenderti.

min konsolas? Ĉiu kanto  
silentadas, ne esperigas la “Pietà”  
skulptita de tiu dudekkvinjara  
dia Mikel-Angel'... (eble nur sole  
liaj “Prigioni”, ene de l' marmoro,  
min aŭdas, en silento).

Se aŭdas nin neni Di'  
super la nuboj, flugo malespera  
estas l' altaj poemoj, kaj sennombre  
poetoj ĉiutempaj,  
tro-ekscititaj, plenigas senlimojn  
ebenajn, kie ili

ŝajnas paroli solaj... Plu nenio  
skribendas, jam. Poeto, ne parolu.

Vi povas nure diri:

“Se Di' ne ekzistas, kulpas Li: la kulpo  
plej grava, ne ekzisti”.

Tamen, nesubpremebla, renaskiĝas  
l' alia respond' en la profundo via.

Eĉ se ne estas Di', kia konsolo  
pli nobla ol unu gesto  
de amo meze de niaj solecoj?

Ĉu vi memoras la rideton luman  
de Charlot kiu trovas pliafoje  
la floro-vendistinon iam blindan,  
sub la urb-lumoj? Ĝojo

perfekta, nure kontenta pri si mem.

Ĉiam la poezi' estas am-gesto,  
mister' nereduktebla kiu vivas  
ene de l' homa kor', kaŝita spuro  
de l' Di' kiun ni serĉas, pruvo certa  
de Lia paso inter ni. Rezistu,  
do, poet'. Simile al Argo, l' olda hund'

karega al Odise': aĝe streĉita,  
flankenpuŝita de la potenculoj,  
restu ankoraŭ, vi, restu aŭskultante  
tiujn voĉon kaj paŝon. Eble tiu  
kiun vi atendas, la Sinjoro, eble  
proksimas. Ho, poeto, ne kapklinu.

El la itala esperantigis: Andrés Turrisi

Poeti in assemblea. EDES – Editrice Democratica  
Sarda (Sassari, 2010). Collana La Biblioteca di Babele.

El: Poeti in assemblea. EDES – Editrice Democratica  
Sarda (Sassari, 2010). Collana La Biblioteca di Babele.





## **Franca Esperanto-Kulturdomo invitas vin en Kastelon Greziljonon**

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj dum somero, aŭtuno kaj jarfino, ĉiam kun E-kursoj kaj aktivaĵoj:

6-13.julio: **Turisma Semajno** por ŝatantoj de turismado kaj ekskursoj al reĝaj kasteloj, de francaj historio, kulturo kaj lingvo, vidu en [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

13-20.julio: **Art-Amatora Semajno** por hobiaj artistoj kaj ŝatantoj de teatro, dancado, kantado, muziko kaj grafika arto, vidu en [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

20-27.julio: **Alternativa MOJOSejo** (por junuloj kaj pri alternativaj temoj) por vegetaranoj, verduloj kaj piratoj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, migremuloj, biciklantoj kaj tendumantoj, vidu en [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

3-10.aŭgusto: **Festa Semajno** speciale por infanoj kaj familioj kun beboj, por adoleskantoj kaj junuloj, vidu en [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

10-17.aŭgusto: **Teatra Aktora Semajno** por amantoj de teatro originala en Esperanto ; dezirantaj labori kun profesia aktoro, vidu en [gresillon.org/s5](http://gresillon.org/s5)

26.oktobro-2.novembro: **AŬTUNE, la ferioj:** Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj, vidu en [gresillon.org/autune](http://gresillon.org/autune)

28.decembro-2.januario: **Jarфина FESTego kaj Novjara FESTeno** laŭ franca maniero kun maskobalo

Resumo de somera programo en vidu en [gresillon.org/somero](http://gresillon.org/somero)

Jara kalendaro en vidu en [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

Ne hezitu kontakti nin telefone al +33-2.41.89.10.34 aŭ sendu retmesaĝon al [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org) aŭ skribu al MCE Gresillon, St.Martin d'Arce, 49150 Bauge en Anjou, France.

Bert Schumann por Greziljono








# 79-a Itala Kongreso de Esperanto en Mazaradelvalo

## Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda





## VIVANTA LINGVO 5: DEMANDO-SIGNO “ĉ”

Johano Negrete

Esperanto naskiĝis kiel skriba lingvo, tute male al la naciaj, kaj tiu ĉi kondiĉo stimulas min verki pri proponeto, kiu povas helpi klarigi kelkajn partojn de tekstoj, kiam ili haltigas nin subite dubi ĉu ni estas antaŭ demando aŭ aserto. En la lingvo hispana oni uzas specialan signon por averti pri demando per la signo “¿”. Per ĝi oni scias, ke temas pri demando ekde la frazkomenco. Sendube en la esperanta, ni havas signojn de enkonduko de demando tiel kiel la vorto “ĉu” kaj la korelativaj k-vortoj. Tamen kiam la demando estas longa, ia ŝancelo en la legado leviĝas pro la duobla rolo de la demando-vortoj. Jen kelkaj simplaj ekzemploj de korelativoj en ambaŭ roloj.

- Kiam* vi venos?
- Mi iros, *kiam* mi povos.
- Kion* vi devas fari, ke vi ne scias ĉu vi venos?
- Mi devas fari tion, *kion* mia patro ordonos min.

Ĉi-tie korelativoj kiel “kiam” kaj “kion” esprimas du funkciojn: demando aŭ relativo. Kaj tiel ni lernas table la seriojn de korelativoj.

Mi opinias, ke en kelkaj kazoj, kiam ajna teksto en Esperanto enhavas longan demandon kaj komenciĝas per *k-vorto* aŭ *ĉu*, oni povus helpi nin per alia demando-signo, kiel en la hispana uzado de “¿” kaj “¡” je la komenco. Nia temo momente estas (kaj ne “¡”). La aplikado de ĉi tiu regulo devas esti tutlibera, cele al nenia ŝanceliĝemo en la eklegado, Jen unu ekzemplo.

¿Kiam mi povis retrovi la tutan manuskripton aŭ malneton de la planita romano, kiu estis perdita dum tiu translokiĝo de nia ferio en Palmasola en la pasinta jaro?

Ni ĉiam valoras bona, praktika kaj utila tiun trajton de la hispana, kiu enfermas la demandon kaj la ekkrian vorteton interjekcio en klaraj limoj, tiel, ke ni povas legi ekkomence la evidentigon de demando aŭ de frazo kun interjekcio.

Kompreneble, ni ne intencas diri, ke antaŭ ĉiu demando, oni uzu la signon “¿”. Tute ne, ni nur rekomendas ĝian uzadon, kiam oni konsideru ĝin taŭga, ĉar ĝi faciligas la tujan kapton de la demanda ideo.

Samkiel en alia artikolo\*, estante la signifo de la vorto “*krom*” en sama duobla signifo, ni argumentis

la ideon, ke oni uzu “*krom*” (senco de aldono) kaj aliflanke “*malkrom*” (senco de malaldono aŭ escepto). La kialo estis klara: oni devas forlasi iun ajn senton de dubo aŭ menshalto en kelkaj frazoj, («*Mi lernis plurajn lingvojn krom esperanto*» aŭ «*Krom Petro tie estis ĉiuj aliaj miaj fratoj*») kie la dusenceco de “*krom*” povas konfuzi kaj oni helpas la komprenon per alia vorto (krom...ankaŭ: “*krom li ankaŭ ĉeestis mi*”). Tiel ni povus diri nun «*Mi lernis plurajn lingvon krom esperanto*» kaj «*Malkrom Petro tie estis ĉiuj aliaj miaj fratoj*». Nenia dubo restas nun.

Certe oni povas tuj riposti, ke Esperanto ne bezonas tiun signon “¿” kaj ke ĝi estas nur balasto, estante la lingvo tute klara en ĝia strukturo de demando-signalo, kaj ĝi sufiĉas tia kia ĝi estas. Ĝi kalkulas kun *ĉu* kaj *k-vortoj* kaj oni pravos pri tio. Sed tamen, la dubo, la ŝanceliĝemo en la eklegado ekzistas, kaj kelkajn frazojn aŭ demandojn povus esti “erarigaj”, se ne dusencaj. Male se verkisto volas esti tute klara en sia diskurso, tia klareco en la legado donas plaĉon, plezuron, kaj stimulon al la legantaro.

Ni ne forgesu, ke Esperanto naskiĝis kiel skriba lingvo, kaj ke tia fakto ĝis nun restas grava en la praktikado de la lingvo. Miloj kaj eble pli ol miliono da esperantistoj disemitaj tra la mondo ne modifas la fakton, ke ankoraŭ la lingvo havas plejparte rolon kiel skriban kodon inter esperantistoj. Kial do estas problemo aldoni rolmontrilon kiel “¿”, simpla signo apud la komenco de longa demando? Ĉi-kaze, “¿” ne havas duoblan sencon, kiel ĉu kiel k-vortoj. Estas klare, ke la helpilo “¿” kovenas al iu ajn skriba lingvo, ĉar en la skribado la voĉtono aŭ voĉnuanco de frazo ne ekzistas kaj helpas nenion por indiki, ke frazo temas pri demando.

Jen kelkaj tekstoj, kiuj bone povus uzi la signon “¿”, kaj kiun ni jam aldonis.

«Sokrato, ¿ĉu vi volas nur ŝajni konvinki nin, aŭ ĉu vi volas vere konvinki nin ke estas ĉiumaniere pli bone esti morala ol malmorala?»

(Platono, **Respubliko**, Parto II, 357; Trad. Donald Broadribb, 1933, eldonita aŭgusto 2000, Aŭstralia Esperanto-Asocio; en Adobe Reader; Vidu <http://www.poboxes.com/bookleaf>).

\* Vivanta Lingvo N-ro 3, “*Krom kaj malkrom*”, en **Venezuela Stelo** N-ro 79, 2006, pp.8-9.



**VIVANTA LINGVO 5: DEMANDO-SIGNO “ĉ” Johano Negrete**

«“Vi estas nedubeble falsisto kiam vi argumentas, Sokrato,” li diris. “Ĉu vi dirus ke iu estas kuracanto, se li erare traktas malsanulojn kaj ni diskutas liajn erarojn? Ĉu eksperto pri matematiko se li faras erarojn pri matematiko kaj ni diskutas liajn erarojn?”»

(Platono, **Respubliko**, Parto I, 341)

«Ĉu Kial nur part' de ter' estus patria land',  
Kiu nin en sufer' baras per lima rand',  
Donas al unu klas' lukson kun la komfort',  
Rabas ĉe sklava mas' ĉion ĝis ties mort'?

Ĉu do en land' kun lim' estus por rajto spac',  
Kie prolet', viktim' sklavas sub la minac'  
De la perforta skurg', ĉiam dum granda ŝtel'  
Uzas ĝin raba burg' nur por malica cel'?»

(Karl Johannson: Senlima Lando; en **Sub la signo de la socia muzo**, Antologio, Red. W. Auld kaj S. Maul, FEL, 1987, p. 14)

«Ĉu vere estas tiel, aŭ, eble, tiu nia aserto estas naive-mensoga, senenhava frazo, kontraŭa al plej evidenta realaĵo, kiun nur ni –blindigita de la fama ardo por granda celo, enlulitaj en sorĉan dormon pro la milde-dolĉaj sonoj de supernacia komunikilo– utopiisme volas nek vidi nek aŭdi?»

(Ivo Lapenna: **Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj**, UEA, 2009; p. 13)

«Ĉu Ni apenaŭ rajtas diri, ke iu plene aŭ hontinde malŝparas sian monon, se la elspezado, eĉ ŝajne kaprica, vere ĝojigas tiun personon?

(Marjorie Boulton: **Faktoj kaj Fantazioj**; UEA, Rotterdam, 2-a eldono, 1993, p. 332)»

«Ĉu ni ne sentus, ke ĉi tiu butikumado pruvas lian superfrenezecon kaj trovas lin iom pli proksima al sano se, aĉetinte la revolveron kaj kuglojn, li elspezus sian restantan monon por frandaĵoj kaj ludiloj, kaj preparus por la familio lastan

regalon?»

(Marjorie Boulton: **Faktoj kaj Fantazioj**; UEA, Rotterdam, 2-a eldono, 1993, p. 334)

«...kaj se mi efektive ekzistas, ĉikiamaniere, kiu trompiĝas, povas trompiĝi dum mi kredas, ke mi ekzistas, se estas certe, ke mi ekzistas dum mi trompiĝas?

(SanktaAgusteno: De Civitate Dei, XXI, 26, en Evaldo Pauli: **Pri dubo kaj certeco**, Fonto, Chapecó, Brazilo, 1984, p. 45)

«Ĉu Kiel knabo en nia skuventa kaj homsvarma riverborda parto de Hamburgo, Germanio, sciuj pri nia nuna monta ermitejo ĉe la senhoma ĝangalkaresa marbordo de eksternorda Kvinslando, Aŭstralio?»

(Trevor Steele : **Kvazaŭ ĉio dependus de mi**, FEL, 2009; p. 9)

«Ĉu Sed ni konsentas, ĉu ne, ke en la natura mondo regas fera leĝo, ke la superan regas la malsuperan?»

(Trevor Steele: **...sed nur fragmento**, Fonto, Chapecó-SC, Brazilo, 2a. eldono, p. 175)

«Ĉu Kial la verbo legi apartenas al la grupo de daŭro kaj rezulto, dum la verbo atendi al tiu de daŭro sen rezulto en la cititaj paĝoj, se povas esti nenia rezulto post ies lego kaj la rezulto de alveno post ies atendo?»

(Mattos: **Apartaj mondoj, verboj kaj participoj**, Fonto, Chapecó-SC, Brazilo, 3a eldono, p. 175).





## **Vizito de Rumanio kun krozado tra Danuba Delto**

**de la 4-a ĝis la 14-a de junio 2012**

**Liba Gabalda**

Rodica Todor, la prezidantino de IFEF organizis vojaĝon tra Danuba delto kun vizito de la urboj Bukureŝto kaj Braŝovo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ni pasigis kune agrablajn 11 tagojn. La aventuran aranĝon partoprenis grupo de 34 esperantistoj el 9 landoj. Unue ni konatiĝis kun la ĉefurbo Bukureŝto. Ĝi estas unu el la plej gravaj turismaj allogaĵoj kaj la plej granda urbo de Rumanio kun pli ol du milionoj da enloĝantoj. Ni loĝis en la hotelo Hello situanta proksime de la Norda stacidomo. Vizito al impona Palaco de la Parlamento, kiu enhavas 6 000 ĉambrojn nin ravis. Ĝi estas la dua plej granda konstruaĵo en la mondo post la Pentagono. Ankaŭ Palaco Cotroceni estas grandioza. En ĝi troviĝas La Administrejo de la rumana prezidento kaj Nacia muzeo. Bukureŝto estas vivplena urbo kaj havas tre belajn parkojn kaj ĝardenojn. Ni promenis en tiu de Cismigiu kaj poste tra la malnova centro. Tre interesa estis vizito de skanseno (subĉiela muzeo) Dimitrie Gusti, kie ni konatiĝis kun diversaj kolektaĵoj de konstruaĵoj el diversaj partoj de Rumanio.

Post tritaga restado en la ĉefurbo ni per buso translokiĝis al la urbo Tulĉa – loko, kie ni enŝipiĝis por tritaga krozado. En Tulĉa ni vizitis ekologian turisman muzeon por konatiĝi kun la deltaj faŭno kaj floro antaŭ ol vidi ĉion per propraj okuloj. Ni navigis sur du kunigitaj hotelŝipetoj. Eblis senĝene trairi de unu ŝipo al la alia. Ni manĝis kaj dormis sur ili. Post halto ĉe la marbordo de la riverego Danubo ni per malgranda boato navigis al danuba rezervejo tra kanaloj, foje inter flavaj kaj blankaj nufaroj por observi birdojn en la naturo. Tio estis interesa spektaklo. Ni vidis plurajn specojn de birdoj. Inter la plej konataj estis cignoj, pelikanoj, ibisoj, cikonioj, kormoranoj kaj amaso da aliaj birdoj. La plej vidinda estis la renkonto kun nestantaj kormoranoj. Ili okupis pluretaĝe la arbojn kaj kriis laŭtege alportante manĝon al siaj idoj. Ni vizitis ankaŭ fiŝistan vilaĝon Mila 23. Post tiu-ĉi neforgesebla travivaĵo ni revenis per buso al Bukureŝto. Survoje ni mallonge haltis ĉe la bordo de la Nigra maro kaj poste ni tagmanĝis en restoracio Murfatlar meze de vitejoj. Ni partoprenis gustumadon de kelkaj vinoj kaj manĝis lokan specialaĵon.

Nia posta celo estis la urbo Braŝovo. Ĝi situas en montara regiono ĉirkaŭ 166 km norde de Bukureŝto. Survoje al ĝi ni vizitis la montaran urbeton Buŝteni.

Rekte super la urbo staras grandega kruco videbla jam de malproksime. Ĉar la bela vetero tion permesis, ni supreniris per telfero al la altebenaĵo de Buĉeĝi. De ĝi ni admiris grandegajn ŝtonojn, inter kiuj sfinkson, boleto-fungojn kaj aliajn formojn de ŝtonegoj. La panoramo de la vasta ĉirkaŭaĵo ravis nin. La Buĉeĝia montaro en Transilvanio estas la plej vizitata loko en Rumanio kun la plej alta pinto Omul - 2505 metrojn super la marnivelo. Ni traveturis ankaŭ Sinaion - luksan turisman centron, kie okazas diversaj eventoj kaj kie vintre oni organizas sportajn aranĝojn.

En Braŝovo ni loĝis en malnova hotelo Coroana situanta en la centro de la urbo. Tie ni renkontiĝis kun lokaj esperantistoj kaj pasigis kun ili agrablajn momentojn dum vespermanĝoj. Rodica, kiu loĝas en tiu ĉi bela urbo, promenigis nin tra ĝi kaj montris al ni la plej interesajn vidindaĵojn. Poste ni vizitis la kastelon Bran, kiu situas je 30 km for de la urbo. Ĝia famo estas ligita al la legendo pri la grafo Drakulo, sed neniuj historia dokumento atestas pri lia ĉeesto tie. Nuntempe estas en ĝi Muzeo pri feŭda historio kaj arto. Revenvoje ni vidis la fortikaĵon Raŝnov, kiu estas nuntempe rekonstruata.

La sekvan tagon, en la vilaĝo Prejmer ni admiris la fortikigitan preĝejon, la plej bone konservitan en orienta Eŭropo. Ĝiaj eksteraj muroj kaj aliaj fortikaĵaj partoj defendis kontraŭ malamikoj. Nun la preĝejo estas sub la protekto de "Unesco". Ne malpli interesa estis la vizito al la sinaja ortodoksa monaĥejo. Ĝi estis fondita fare de princo Mihai Cantacuzino en la deksepa jarcento kaj estas tre bele dekorita. Impresis nin la reĝa kastelo Peleŝ kun belega interno konsistanta el 160 ĉambroj. Ĝi estas la antikva somera rezidejo la reĝo de Rumanio Carol I (1866-1914). La korton ornamas vico de statuoj kaj bele aranĝita promenejo. Tiu ĉi kastelo estas nuntempe unu el la plej vizitataj en Rumanio. Rodica montris al ni multajn belajn kaj allogajn lokojn: preĝejojn, kastelojn, muzeojn, mirindan naturon kaj aliajn interesajn vidindaĵojn. Ĉio tio estis spicita per ŝia spriteco, rideto kaj sindonemo. La suno akompanis nin ĉiutage. Ni manĝis en belstilaj restoracioj, konatiĝis kun rumana historio, renkontis afablajn homojn kaj ĝuis agrablan etoson. Ĝi estis mirinda vojaĝo kun neforgeseblaj travivaĵoj, certe ripetinda. Ni daŭre sentas nostalgion pri tiom riĉaj kaj plezurplenaj tagoj.





## Vizito de Rumanio kun krozado tra Danuba Delto Liba Gabalda

Fabela lando havanta naturajn belaĵojn, montarojn, maron, pitoreskajn vilaĝojn, grandiozajn urbojn, riĉan kaj diversflankan kulturon. Tio estas Rumanio.







Vizito de Rumanio kun krozado tra Danuba Delto Liba Gabalda



Parlamento




Bukurešto



LA MUZEUL NAȚIONAL COTROCENI

RUMANIO



Skanseno




Krozado sur Danuba Delto



Nestantaj kormoranoj



Ce Nigra maro



Montaro Bučeği



Brașovo



Kastelo Peleș



Kastelo Bran



Prejmer

Junio 2012



Monaĥejo







## FORPASOJ



**Brigitte Clarac**; naskiĝis en Martiniko (kariba insulo) la 20-an de aprilo 1950 kaj mortis je 10<sup>a</sup> de marto 2013 en la ŝtato Karabobo (Carabobo). Ŝi eklernis esperanton en kurso gvidita de Rafael Mejía en 1981 kaj en 1982 sukcese partoprenis en porinstruista E-kurso. Ŝi estis kasistino de Venezuela Esperanto-asocio en la jaroj 1983-1985 kaj delegitino pri Biblioteko (jaroj 1985-1986). Partoprenis en la Unua Venezuela Esperantista Renkontiĝo (jaro 1982) kaj Dua Venezuela Esperantista Renkontiĝo (jaro 1984). Ŝi estis membro de la Asocio ĝis la fino de la jaro 1988. Ŝia fratino Raymonde Clarac esperantiĝis kelkaj jaroj antaŭe kaj partoprenis kun ŝi dum la 1980aj jaroj en nia movado.



**Maritza Graziani**; naskiĝis en Puerto Cabello je la 6<sup>a</sup> de julio 1950 kaj mortis je la 26<sup>a</sup> de februaro 2013 en Hispanujo. Eklernis esperanton en Kurso gvidita de Rafael Mejía en 1980. Ŝi multe helpis pri la organizado de la Dua Venezuela Esperantista Renkontiĝo kaj komisiistino en la redakcio de Venezuela Stelo dum la jaroj 1985-1986, estis deligitino pri Jubilea Centjariĝo (1985-1987). Ŝi edziniĝis kaj translokiĝis al Hispanujo je la jaro 1990. Ŝi Partoprenis en la televidprogramo de Aurora Martínez “La Tierra y su gente” en la televidkanalo Televisora Nacional je la 21<sup>a</sup> de marto 1987; en tiu programo partoprenis krom ŝi: Jorge Mosonyi, Juan Bachrich, Raymonde Clarac, Rafael Mejía kaj Alfredo Portillo.

**LA IDEALO DE FLOR****José Rafael Pocaterra****EL IDEAL DE FLOR****I**

Aperas virino kun pleto, drinkaĵoj kaj glasetoj. Mi petas ruĝan vinon. Ŝi ridetis. Ili ĉiam ridetas laŭ sia trejnado. Tio jam malmulte impresas min, malgraŭ ŝia bela korpo kaj impeta personeco. Krome mi mem, ankoraŭ ŝokita de la amoraĵo kun Munja, ne kapablas percepti la belecon de aliaj virinoj. Ne gravas. Mi prenas vinboteleton kaj dankas afable. Ruĝa vino *Lazo* el la centra valo de Ĉilio, rebo Merlot. Bona vino! Preferinde mi preferas trinki vinon inter pluraj alkoholaĵoj, kvankam biero foje pli taŭgas por tiuj karibaj varmaj klimatoj, kie ŝi kaj mi vivis la plej feliĉajn tagojn de niaj lastaj aventuremaj tempoj. Ho, Nemo! Denove ŝi kaj ŝi en miaj pensoj... La pasinteco invadas.

Nun la motoroj de la aviadilo ronkas pli forte. Mi supozas, ke oni plialtigas la aviadilrapidon por eliri pli baldaŭ de tiu nubmaro konsternanta la animon, kiu ĉirkaŭis kaj lasis onin sen kontakto kun la mondo, almenaŭ vide. Estas la lasta horo de la taglumo. Tri tagojn antaŭajn Munja flugis al sia destino en la norda Eŭropo, tio estas, al bela

lando kun tre malmultaj loĝantoj kaj multaj lagoj, laĝetoj kaj arbaroj. Preskaŭ eblas diri: unu lago por ĉiu loĝanto, se la distribuo estus racie farita. Mi revas subite pri ni ambaŭ en tre malvarma nuda bano tiulande. Terure! Ne povus mi fari tion.

Post vinglutaĵo kaj agrablo pri vinkvalito mi decidis malfermi la kajeron de Munja, Ŝi ĝin donacis kun akompanataj larmoj, kaj sendube mi taksis tian donacon kiel ion tre grava por ŝi. Plie, ŝi petis min legi la kajeron poste kaj estonte sola. Estas nun precize kiam estiĝas la oportuno, ĉar fronte al mi restas ankoraŭ pluraj horoj de soleco por atingi la flughavenon — kaj neniu apudas min en la aviadilo.

La kajero estas verda kaj tro dika; tio min suprizis kiam mi deprenis la beletan paperkoverton envolvintan la donacon. Mi malfermas ĝiajn paĝojn plenigite de kuriozaĵo por foliumi kaj tuj trovis, ke ĝi ne estas vera kajero, sed printita leteraro ordigita laŭlibre kun presita koverto. Sur la verda koverto bele skribita titolo grandlitere anoncas la enhavon: *La Insulo de Nemo*. Kia surprizo! Tio forte kortuŝis min.

Mirindas la belanima donaco de mia kara Munja. Tiam mi ekmoviĝis sur la aviadilseĝo kun maltrankvileco. Unuavide mi kredis la kajeron enhavi rakonton de niaj lastaj tagoj sur la insulo, sed ne. Ĝi temas pri niaj unuaj renkontiĝoj ĉe la reto kaj la sekvo. Tamen mia volo ĉi-momente ne estas por revigigi la lastan periodon. Mi deziras trapasi tiun bildon ĝuste tuj! Do, la devo estas rezisti. Ne plu esti trenata al melankolio, en kiu mi sentis tute merĝita apenaŭ dekduo da horoj antaŭe. Sekve, mi spiris pli forte serĉante eskapi, sed klare tutvane. La aviadilo prizonigas min kaj mi bezonis pli ol dek minutojn por retrovi la sintenon kaj repreni kuraĝon revidi tiujn paperojn.

Sur la dua paĝo troviĝas desegno per malmultaj linioj de virina vizaĝo kun perdita rigardo; apude sur ŝia orelo io, kio ŝajnas sablohorloĝo. Kvazaŭ se tio ŝajnigus, ke la virina revo flugas en alia tempa dimensio. Sed la desegno nur ornamas poemeton de Mila Ramos titolita *Tiel*. Ni vidu kion diras la versoj.

Mi vin amas  
laŭ amado antikva.  
—gusto de antikve  
en la malnova kajero  
de l' memoroj—

Mi vin amas tiel  
laŭ amado antikva,  
ne tuŝita,  
abstrakta  
ne direbla,  
sentempa.  
Tiel.

Bela enkonduko! Almenaŭ taŭga por la temo de





## La Insulo de Nemo (IX) Johano Negrete

retaj geamantoj. En la sekvanta paĝo aperas la komenco de ĉio. Tio estas, la unua letero de Munja aŭ almenaŭ modelo de kolektiva mesaĝo; jen ĝi kiel la unua letero de la kajero.

8-a de septembro, 1999

“Kara sinjor(in)o:

Mi havas la plezuron informi al vi la daŭrigon de la kurso de Esperanto la 21-an de septembro en mia vilaĝo Rovakyla, municipo Taivalkoski (norde de Finnlando).

Mi multe dankos vin, se vi povas sendi perrete aŭ perpoŝte apogleteron aŭ poŝkarton por fari ekspozicion, kiu montros en mia vilaĝo la intereson kaj utilon de la lingvo por la internacia amikeco.

Bonvolu sendu ilin al mia retadreso aŭ loĝadreso malsupre. Multajn dankojn al vi pro via apogo!

Kun koraj salutoj,  
Munja Vareski.

Rovakyla, Lenkoventrie 18-A,  
FI-03593, Vanhala, Finnlando

La unua letero multe impresis min kiam alvenis al mia komputoro –nun mi povas ĝin memori kaj preskaŭ senti same. Kio tre impresis unue estis la lando: fora loko norde de Finnlando. Mi memoras. Mi imagis la solecon kaj triston de lando eterne neĝa. Due la iniciativo de iu kuraĝa persono instruante tiun ekzotikan lingvon, ĉe preskaŭ la mondbordo de la loĝata geografio aŭ pli precize proksime de la norda poluso. Tiel nur kutimas labori kuraĝa persono –mi ne scias, ĉu viro aŭ virino pro la fremda nomo Munja, –zorganta pri la ideo de monda interkompreno! “Ankoraŭ ekzistas bela idealismo sur tiu ĉi tero” mi diris al mi mem, kaj preskaŭ tuj respondis la leteron.

Kial respondi? Nu en tiuj tagoj mi havis la emon kontribui kun diversaj esperantaj petoj ĉe mia komputoro. Ne estis do peza tasko sendi mesaĝon al idealisma persono, Munja Vareski. –Bela nomo! Ĉu de viro aŭ virino?– Tio ĉi, mi tiam pensis. Krome, mi eĉ memoris saman kazon kun unu el miaj lingvokursoj en duba situacio de subteno. Tiam mi petis helpo al du esperantaj revuoj kaj la institucio ricevis baldaŭ aron da privataj apogleteroj kun gratuloj favorintaj malfermon de tia kurso. Tiu iniciativo estis bona, kvankam ne tute plaĉis al la celita vicdirektorino, Do, aparte de la kurso mi aldonis eldonpeton de esperanta bulteno. La decido venis: «la kurso jes, la gazeto ne». Tamen poste alvenis aprobon por gazeto de alia aŭtoritatulo. Fina rezulto: dum pluraj jaroj la gazeto sukcesis, la kurso ne. Kurioza rezult-paradokso.

Do mi sentis, ke mi devis eksidi kaj skribi iom al tiu viro aŭ virino, ĉar tiel estas la mondo de esperanto... tial mia unua kontakto kun Munja aperas tie ĉi: en ŝia propra kajero! Ankoraŭ ŝi konservis la leteron! Kiu povus diveni, ke ĉi simpla tekston malfermus sekretan kaj novan senton de

koramikeco inter gefrenduloj, kaj ke ŝi gardus ĝin kiel trezoro? Jen mia respondo:

9 de septembro, 1999

Estimata s-r(in)o Munja Vareski:

Mi deziras esprimi al vi la ĝojon kaj plezuron, kiun mi sentas pro la novaĵo de via klopodo por starigi regularan kurson en tiu vilaĝo aŭ urbeto, kiel floro en izoleco ene de la esperanta mondo. Ĉar hodiaŭ, danke al esperanto kaj interreto, ni esperantianoj estas pli kaj pli unuiĝantaj en nia mondo. Esperanto kaj interreto estas bonaj amikoj en nia kreskanta nova mondo por paco kaj egaleco inter homoj de ĉiuj kulturoj.

Saluton kaj multajn bondezirojn al la esperantistoj kaj lernantoj el via municipo Taivalkoski.

Amike, Nemo

“Kia mirindaĵo havi enmane denove tiujn liniojn, kiuj ekimpetis, kvankam senkonscie, al la amikeco kaj amo!” Tion mi esprimis preskaŭ duonvoĉe en la aviadil-karapaco. La surprizo de la Munja-kajero pligrandiĝis, kiel juveloj, sur kiuj oni ne rimarkas unuavide la diversajn brilojn, ĉar la lumo malabundas aŭ la vizi-angulo ne favoras la nuancojn de la lumradioj. Tiele, sensignifaj gestoj aŭ agoj, de la ĉiutaga vivo –oni neniam scias– povas poste mirigi nin, ĉar pro la tempopaso kaj la teksado de l' vivo, ili turniĝas tre gravaj en la vivkurado kaj nepre la klara konscio alpropigas al si tiujn eventetojn, en decida konstruo de nia propra vivformo.

Mi emocia legado de la leteroj, donis al mi la dimension de la ĵus vivita aventuro kun Munja. Mi kisis la kajeron. Adoris Munja-n nun enfermita en la kajero, kaj memoris tiujn vortojn de la poeto: «Se vi pariĝas faru tion kun la profunda sento pri la tuta grandiozo de la ago, kiun vi plenumas», diris Omer Haleby en **El Ktab**; kaj sekve «Donu vin plene kaj tute al tiu ĉi ago, metu en ĝin vian animon kaj la spiriton same kiel la korpon».

Precize ĉio, kion nek Munja nek mi povas nun fari. Ŝi apartenas al ŝia mondo kaj mi al la mia. Mi ŝatus, ke iu Dio helpu rompi la pezan ĉenon de mia kordoloro. Aŭ trovi amikon al kiu mi povus paroli pri miaj malfortoj, sed malagrablas, ke tia ulo ne aŭskultu aŭ malĉestu. Kial, kial Dio al ĉiuj homoj tiom plaĉas? Eble ĉar neniam oni vidas Lin vizaĝ-al-vizaĝe. Ne scias ĉu Li helpos, ĉu Li venos, ĉu Li estas amiko aŭ malamiko. Ne solas mi vere, sed nun sole vojaĝas ĝis... ĉu la insulo de malfeliĉo?

(Daŭrigota)



**LA 20-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**  
**de la 6-a ĝis la 13-a de oktobro 2012**  
**Liba Gabalda**

Venezuela Esperanto-Asocio

Kutime la unua oktobra semajno estas rezervita por la tradicia E-aranĝo en Hispanio. La ĉi-jara jubilea 20-a E-Semajno okazis en la ĉemara urbo “Cambrils”, situanta 16 kilometrojn sude de Tarragono. La aranĝon organizas grupeto da entuziasmaj esperantistoj el Barcelono kaj Sabadell sub la gvido de Luis Serrano Pérez. Dum la aranĝo li ankaŭ prizorgas libroservon.

Ĉi-foje la aranĝo atingis rekordan nombron da partoprenantoj. Alvenis 144 gesamideanoj el 13 landoj. Ni loĝis en granda 4-stela hotelo “Cambrils” en proksimeco de la plaĝo, kiu etendiĝas je 18 kilometroj laŭ la maro. Multaj profitis la posttagmezajn paŭzojn por promenadi laŭ ĝi kaj ankaŭ baniĝi en Mediteraneo. La vetero en tiu ĉi sezono estas ĉiam agrable varma. Ankaŭ la hotela naĝejo estis ĉiutage plenplena de hotelgastoj. La hotelo disponas pri 400 ĉambroj. Ĉiuj estis okupitaj. Oni aŭdis krom la franca, plejparte la rusan lingvon. Iuj gastoj scivolis pri Esperanto. Nia aranĝo estis la lasta de tiu-ĉi sezono dum kiu la hotelo funkciis. La prezoj estas malpli altaj ol dum la someraj monatoj.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestrino de “Cambrils” kaj aliaj du membroj de la urbestro. Nomo de UEA salutis la ĉeestantaron Barbara Pietrzak el Pollando. Ŝi pli poste prelegis pri la 125-a centjariĝo de la Unua Libro. La saman temon oni ankaŭ pritraktis en debato, kiun gvidis Luis Serrano. Ĉiutage (krom la tuttaga ekskurso) Rodica Todor el Rumanio animis kun granda sukceso la E-kurson. Pro ŝiaj profesiaj psikologiaj spertoj la kurso fariĝis interesa kaj sekvis ĝin multaj entuziasmaj lingvoŝatantoj. Ŝi eĉ havis ideon krei komunan libron pri la temo: ”Kial restas multaj personoj ĉiamaj komencantoj kaj kiamaniere ni povus solvi tiun fenomenon?”. Gian Carlo Fighiera el Italio alloge prezentis la verkon de Victor Hugo “La Belulino, la Monstro kaj Nia Damo”. La geedza paro Michèle kaj Hubert el Belgio klarigis kiel plibonigi sian esperanto-lingvoscion per prelegoj. Per bildoj kaj komentario ili rakontis pri siaj spertoj en Esperantujo. José Boccadifuoco el Francio rakontis kortuŝan biografion de siaj gepatroj. Temis pri “Rememoro de milito”. Profesoroj Júrte Buŝiene kaj Aldis Buŝs el Latvio prezentis serion da prelegoj. Ili konigis al ni informojn pri baltaj landoj: Litovio, Latvio kaj Estonio. Pri sia lando ili montris film-fragmentojn el kultura kaj festa vivo kaj rakontis pri sistemo de instruado en Latvio. Krome ni eksciis kio estas hipofeo - planto kun oranĝaj

beroj enhavantaj multe da vitamino C. Manfred Sona el Germanio enkondukis kaj klarigis interesan temon: “Baza enspezo senkondiĉa”. Ĝi estus bona rimedo por forigi malriĉecon kaj doni kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi digne. Lia prelego instigis al vigla diskutado. La prezidanto de HEF (Hispana E-Federacio) José Antonio del Barrio rememorigis gravajn hispanajn esperantistojn de antaŭ la hispana intercivitana milito. Pro la ĉiutaga vespera hotela programo ne eblis okazigi kelkajn el niaj vesperaj programeroj. Tial iuj gesamideanoj pli frue enlitiĝis, aliaj profitis dancadon, spektis flamenkan prezenton kaj magiaĵojn. Tamen ni ĝuis la du interkonajn vesperojn kun hispana “Cava” - ŝaŭmvino kaj ankaŭ vesperon kun “cremat” (bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj). Nur bedaŭrinde la folkloro ensemblo “Montjuic” pro certaj miskomprenoj ne venis ĝojigi nin per siaj kantoj. La hotelo provizis disko-muzikon kaj kontentigis nin per kelkaj havanaj melodioj.

La premio “Ada Sikorska” estis ĉi-foje aljuĝita al Vilhemo Lutermano, kiu multe laboras por Esperanto. Li organizas retforumon MAS, redaktas Esperanto-version de “Le monde diplomatique” kaj eldonas E-librojn. Li loĝas en Kubo kaj pro tio li ne povis transpreni la premion persone.

Kutimaj (dum tiu ĉi aranĝo) estas unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Dum la unua duontaga ekskurso ni vizitis la E-muzeon en “Pau d’Ordal” kaj la vinkelon “Massana”. Tie ni gustumis kaj povis aĉeti diversspecajn vinojn. La dua duontaga ekskurso celis la monaĥejon de “Escornabou”. Ĝi estis plurfoje renovigita kaj nun servas kiel muzeo. Apuda rigardejo donis eblecon observi belan kaj vastan ĉirkaŭaĵon. La tuttaga ekskurso estis ĉi-foje iom nekutima. Unue ni vizitis planetarion en la urbo “Castelló”. Poste atendis nin surprizo. Ĉiuj 90 ekskursantoj estis invititaj al la hispana specialaĵo “paella”. Preparis ĝin je niaj okuloj s-ro Conejero en sia hejmo. La afabla akcepto fare de la familio estis por ni vere agrabla surprizo. Ni ankaŭ gustumis kelkajn fruktojn el la ĝardeno de la gastigantoj.

La Semajno estis sukcesa, la vetero favora, hotela manĝo abunda, la etoso gaja kaj amika. Koran dankon al niaj fervoraj organizantoj kaj kunhelpantoj pro la bona laboro, kiu ebligis al ni ĉeesti tiun ĉi ŝatatan aŭtunan eventon. Ĝis revido venontjare denove en Katalunio.





# LA 20-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO



## CAMBRILS



## 2012



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda







# LA KVINDEKA JARIĜO DE DOKTORO KIU (Doctor Who)

Pedro Jaimez

Venezuela Esperanto-Asocio


En la jaro 1963 estis dissendita en Anglujo la unua programo de la BBC televida serio “Doktoro Kiu” malmulte konata ekster Britio ĝi devenis la plej longdaŭra sciencfikcia televidprogramo en la mondo. Ĝi estis farita ĝis la jaro 1989. Aparte de televidfilmo farita en la jaro 1996, ĝi restis nur memoro, sed en la jaro 2005 ĝi estis refarita (Danke al Russel T. Davies) kaj havas grandegan sukceson ĝis hodiaŭ. Nun ĝi estas videbla en la tuta mondo; en Venezuela estas eble spekti ĝin kelkfoje en Directv, kaj estas elŝutebla en la internet. Li eĉ havas paĝon en Vikipedio en esperanto.

Ĉijare ni festas la kvindekan jariĝon 1963-2013, kaj “Doktoro” Kiu estas unu en la plej interesaj programoj en la mondo.

La ĉefrolanto kies nomo estas nur “La Doktoro”, estas eksterterulo, Lordo de la Tempo (Time Lord) kun du koroj, kiu povas ŝanĝi la fisikan formon, danke al tiu ebleco povis ludi la saman rolon 11 sinsekvaj aktoroj. Li estas geniulo kiu uzas sian intelekton nur por la bono, li kontraŭas la perforton kaj preferas uzi la menson anstataŭ batali, tiagrade ke li preferas fuĝi ol militi kontraŭ la malamikoj. Li kutime vojaĝas kun kunvojaĝantoj, fojfoje belaj junulinoj.



La nuna Doktoro Matt Smith, ludante en la kristnaska programo de la jaro 2012, la rolon de La “Doktoro”. Li estas en la kontrolĉambro de la TARDIS.



La dekunu Doktoroj ĝis nun.

Lia kosmoŝipo estas la TARDIS (TIME AND RELATIVE DIMENSIONS IN SPACE-Tempo kaj relativaj dimensioj en la spaco)



## La TARDIS

La TARDIS havas la eblecon ŝanĝi la eksteran formon al iu ajn formo kaj tiamaniere kaŝi sin, sed la TARDIS de la doktoro estas iom temperamenta kaj la kaŝcirkvito restas per ĉiam en la formo de Brita polica skatolo de la sesdekaj jaroj. La TARDIS solvas la problemon de la lingva diverseco tradukante aŭtomate kaj rekte en la menso ĉiuj el la lingvoj parolataj.

Kiam ni pensas pri kosmoŝipo venas al la menso la ideo de la Stelŝipo Entrepreno (Enterprise de la serio Star Trek) kiu estas esence nur batalŝipo pli potenca kaj kapabla de interplanetvojaĝoj. La TARDIS estas io tute alia, ĝi estas pli grande interne ol ekstere, ĝi povas vojaĝi ne nur tra la spaco, sed ankaŭ tra la tempo. La pasinto, la estonto aŭ la nuno estas al ĝi la sama





## LA KVINDEKA JARIĜO DE DOKTORO KIU (Doctor Who) Pedro Jaimez

afero de kio devenas la titolo de la “Doktoro”: “Tempo Lordo”.

La TARDIS ne havas armilojn, kaj la “Doktoro” estas pacamanto, kiu batalas kontraŭ la malbono danke al la scienco, kaj al la fido je la fundamenta boneco de la universo.

Miaj plej ŝatataj Doktoroj estas la kvara kaj la deka.



**La deka doktoro (David Tennant) kun Rose Taylor (Billie Piper)**

En Anglujo ekde 2005 estas kutimo en la kristnaska tago rigardi la kristnaskan specialan programon de la “Doktoro”, kaj la programo estas parto de la angla vivo kaj ĝi neniam estis tiel populara kiel hodiaŭ. Danke al la teknologio la “Doktoro” estas nun multe pli konata, kaj estas propraĵo de la tuta mondo. Estis interalie nomita en the Big Bang Theory (Usona programo komika ege populara kaj mondfama) kaj “Doktoro Kiu” estas la plej populara programo de BBC Amerika.

Se vi povas rigardu Doktoron Kiun ĉu pere de la televido aŭ en la granda kvanto de romanetoj dediĉitaj al la serio, vi certe, se ne devenus, fanatikulon, almenaŭ havos agrablan sperton.

Feliĉan datrevenon “Doktoron”.

*La Bildoj estas propraĵo de la BBC.*





## "Tie ĉi li trapasis, kunulo"

Thairon Martínez

Venezuela Esperanto-Asocio

La kvina de marto 2013 mortis Hugo Rafael Chávez Frías, ĝistiam prezidento de la Bolivara Respubliko Venezuelo. Ekde tiu momento mondo komencis konsciadi ke tiu viro ĉiam ege fipriparolita, estis tute malsama antaŭokule de lia popolo, kaj antaŭ la vido de aliaj mondaj popoloj (ĉefe tiuj suferantaj imperiismajn agojn). Ĉu tiu viro estis fipriparolita juste aŭ mispriparolita intence?

Mi, kiel venezuelano, ne povis depreni min el tiu situacio. Estante filmisto pri sociaj kaj mediaj aferoj, kaj venezuelano tre aktiva je popolaj naciaj luktoj, mi sentis urĝon aldoni eron el mi por kontribui je la nacia resaniĝo per la kompreno de nia katastrofo.

Ĉiam ŝajnis al mi ke Venezuelo estas lando de ĉiama urĝo. Iom ĝendona tia trajto de nia regno, ĉefe kiam mi pretas starigi iniciataĵojn valorindajn por nia esperantisma movado, kaj nova amasbruo eksonas, trude prenante mian respondecon al solvado de nova nacia minaco: ĉu amaskomunika mensogado de riĉegaj nacioj, ĉu de imperiismaj organizoj, ĉu nova balotado (ĉi lando havas pli da balotoj ol ĉiu alia en Ameriko), ĉu nova puĉa klopodo... Sed mi devas konfesi ke la kororompa okazaĵo de la 5a de marto estis la plej spirŝtela kiun mi memoras post tiomegaj spertitaj sociluktoj.

Mi tuj prenis la mikrofonon, sekigis la larmojn kaj aliris kun miaj laborkunuloj filmregistri tiun memorigotan parton de la amerika kaj monda historio.

Dum multaj tagoj la homoj amase sin ĵetis al la stratoj por kuniri al tiu loko kie restis la senviva korpo de la nacia gvidanto, "tiu kiu vekis nin", diris ree la aldemandatoj.

- Mi ploris kaj eliris el mia hejmo al la placo Bolívar
- Kaj kion faris vi en la placo?
- Mi ploris kun la aliaj, mi kantis la nacian himnon kun la aliaj... eble mi iris tien nur por renkonti la aliajn kaj kompreni ke mia forto estas en la kuneco.

Tiel parolis la homoj de vunditaj koroj antaŭ la mikrofono kaj tiam mi ekkonsciis: La plej aminda rezulto de la penoj de Chávez, estas la virto homoj trovi sin en malpropraj okuloj, kompreni ke ĉiu estas nur ero de la socia vefto, kompreni ke malgraŭ la kapitalismaj propagandoj, ni, vere, ne estas solaj.

Miaj penoj donis al miaj samlandanoj filmon kiu montras agrikulturiston en ties natura poezio,

donante sian humilan kvankam saĝan lecionon pri vivo, al tiuj kiuj kredas ke nia revolucio ne estas apoginda nur tial ke ĝi ne estas "perfekta". La senkulpajn pensojn de fiŝkaptisto ni povas vidi en liaj larmoj, malgraŭ lia forta suntolerema korpo, kiam li diras al ni: "ni sentas grandan doloron, sed ni restas ĉi tie kaj ni daŭros antaŭen".

Eble la plej memorinda leciono kiun donis la filmo (laŭopinie de kelkaj uloj) estas ke oni rimarkas finfine, ke la bolivarisma revolucio estas dediĉita al tiuj kiuj plej suferas.

Esperinde, mi baldaŭ havos tempon liberan por esperantigi tiun flimon, kaj publikigi ĝin interrete. "Tie ĉi li trapasis, kunulo", nomiĝas la filmo, reference de fama nacia poemo (verkita de Alberto Arvelo Torrealba) kiun Chávez kutime deklamadis:

Tie ĉi li trapasis, kunulo,  
 al tiuj montetoj, fore  
 Vidu lian postsignon ĉe la pajlo  
 vidu ĝin, kunulo,  
 Kiel la klaraj pluvetoj  
 sur la reseka tereno,  
 kiel puto en altebenaĵoj,  
 kiel brilstelo sur rivereto,  
 kiel la ardeo surjunke,  
 kiel la flugoj vespere,  
 kiel la neĝo surverte,  
 kiel la brulego dumnokte,  
 kiel la lampiro en la aero,  
 kiel la luno surdune,  
 kiel la ĉevalido en la Blazono  
 kaj la trikoloro en la ĉielo.

Tie ĉi li trapasis, kunulo,  
 al tiuj montetoj, fore.  
 Tie iras lia figuro sola,  
 aglosimila serioza profilo,  
 selo el brunigita ledto,  
 ĉevalo de brava brusto.  
 Kvazaŭ flago iras lia mantelo,  
 kvazaŭ celilo lia ĉevalo.  
 Artisto ĉizante popolojn.  
 Homo burĝonumante patrujojn,  
 pikante glorojn, trupano!







## La 65-a IFEF-KONGRESO

**Temo de la kongreso: Rolo de la fervojoj en la disvolviĝo de la moderna mondo.**

**Raportis: Liba Gabalda**

Ĝi okazis en la sudokcidenta parto de Francio de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en *Artigues près Bordeaux* (Artigues ĉe Bordoza) Samtempe kongresis UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto). Esperanto harmonie kunigis la du asociojn. La aranĝojn partoprenis pli ol 250 geesperantistoj el 17 landoj. Al la kunorganizado multe helpis la ĝirondia Esperanto-grupo, kies prezidanto estas Bernard Sarlandie. Pri altkvalitaj kulturaj programeroj en kiuj rolis ĉiuj grupanoj zorgis precipe Marcelo Redoulez kun Claudine Pomiro. Jam la nekutima interkona vespero donis imagon pri io eksterordinara. Kaj tiel efektive estis dum ĉiuj vesperaj kulturaj programeroj. Multaj surprizoj atendis nin. Al interkoniĝo kontribuis per akordiona muzikado kaj E-kantoj la konata franca esperantisto FAMO.

En la dimanĉa solena inaŭguro honorigis nin la vicprezidanto de la ĝenerala konsilio Jean-Marie Darmian. La bonvenigon de la ĉeestantoj komencis la prezidantino de LKK (Loka Kongresa Komitato) Sylviane Lafargue. Salutis Rodica Todor - la prezidantino de IFEF, Claude Nourmont - la vicprezidantino de UEA, Bernard Sarlandie - la prezidanto de ĝirondia E-grupo, Stefan Mac Gill nome de ILEI. Sekvis kantado de E-himno kun akordiona akompano de FAMO. Post la paŭzo komenciĝis salutado de ĉiuj reprezentantoj de ĉeestantaj landaj asocioj, kaj oni legis ret-alvenintajn bondezirojn de gravaj organizaĵoj kaj unuopuloj. Inter kiuj ankaŭ tiu de Probal Dasgupta la prezidanto de UEA. Antaŭ la fino Rodica Todor honorigis kaj transdonis diplomojn al Jeannine Daguin, Bernard Sarlandie kaj Marcelo Redoulez pro ilia meritplena laboro por Esperanto.



## La 65-a IFEF-KONGRESO en ARTIGUES ĉe BORDOZO

Post la tradicia komuna fotado ĉiuj estis invititaj al aperitivo okazanta antaŭ la restoracio. Sunbrilo aperis sur ĉiuj vizaĝoj.

Dum la semajno okazis fakaj prelegoj, komitat-kunsidoj, diversaj labor-kunvenoj, oni pritraktis movadajn aferojn, prezentis novaĵojn el fervoja mondo. Kundiskutis terminara komisiono, okazis ILEI sesio pri la projekto de E-kurso ne nur por fervojistoj. Tre allogaj estis la prezentoj de la venontaj IFEF-kongreso en Italio kaj tiu de UEA en 2015 en Lillo. Oni spektis filmon pri Esperanto kaj mallongan humuran desegno-filmeton "La bariergvardistino". Daniel Moirand tre lerte rakontis pri "Mil kaj unu noktoj". Stefan Mac Gill prelegis pri "Rolo de la fervojo en moderna mondo", Michel Lafosse tre kompetente kaj detale prelegis pri "Bordoza tramo". Lia prelego kompletigis antaŭan viziton de kelkaj interesuloj al la tram-prizorgejo. Ili konstatis grandan similecon kun trajn-riparejo. Robert Combes kun sia



## La 65-a IFEF-KONGRESO Liba Gabalda

edzino prezentis bildojn pri la konstruado de la “Viadukto des Fades”, nuntempe jam ne funkcianta. Mireille Grosjean parolis pri “Japanaj trajnoj”, Andrej Grigorjev el Kranojarsk pri “Siberia fervojista sindikato”, Pjer Buvje pri la “Unua libro kaj la Bona Lingvo”, Marcelo Redoulez pri “Bordoza Maskeronoj”. Bone funkciis libroservo, okazis ekumena Diservo. La prezidanto de la ĝirondia Eklubo Bernard Sarlandie kontaktis ĵurnalistojn kaj oni aperigis artikolojn pri Esperanto. Aperis tri numeroj de kongresa bulteno. Estis reelektita la ĝisnuna estraro por trijara periodo. Ankaŭ UFE elektis kaj prezentis novan estraron kaj pridiskutis siajn movadajn aferojn.

Al agrabla postagmezo-fino kontribuis la muzikgrupo “Maragane” instruante gaskonajn dancojn. Alian tagon same entuziasme instruis kantadon Ankie kaj Nanne - la duopo el Kajto. Ambaŭ grupoj prezentis vesperan koncerton. Ili plezurigis la ĉeestantojn - pri tio atestis longaj varmaj aplaŭdoj. En aliaj vesperoj temis pri lirikaĵoj de Morine Stride kaj plaĉaj kantoj kun pian-akompano de Isabelle. Tre amuzan spektaklon “La sekreto de la magia trajneto” prezentis kanta kaj teatra trupo “La Kompanoj” de Esperanto-Ĝirondio. Ĝi estis speciale kreita por la fervojista kongreso. Bankedo plensatigis ĉiujn kiuj partoprenis ĝin. Tripersona fervojista orkestro dancigis kelkajn ĉeestantojn. Al la internacia vespero kontribuis la ĉeestantoj per kantoj, poemoj, mallongaj rakontoj kaj muzikado.

Okazis pluraj duontagaj ekskursoj dum kiuj ni vizitis (per piede aŭ el panorama buso) la belan urbon Bordoza. Alia interesa vizito gvidis nin al la rava mezepoka urbeto *Saint Emilion* (Sankta Emiliono) situanta en la koro de la bordoza vitejo. Ĝi estas konata ĉefe pro bona ruĝa vino, kiun ni ĉe la fino de la vizito gustumis. Alia tiea specialaĵo por frandemuloj estas makaronoj. Nu, la urbeto riĉas je historio. La plej interesa malkovro por ni estis vizito de la plej vasta monolita preĝejo en Eŭropo. Aliaj ekskursantoj partoprenis viziton al la Citadelo de Blajo.

Marde la tuttaga ekskurso kondukis nin al Arkaŝono. Tie ni surgrimpis la dunon *Pilat* por spekti

vastan ĉirkaŭaĵon - unuflanke arbaron, aliflanke maron. La sablo estas tre fajna. Ŝippromenado tra la arkaŝona golfeto ebligis vidi la dunon de alia flanko. Ĝi etendiĝas je distanco de 2,7 kilometroj kaj altas pli ol 100 m super la marnivelo. Bonege ni tagmanĝis en loka restoracio.

Alia tuttaga ekskurso vizitigis al partoprenantoj la subĉielan landezian vilaĝon Markvezo. Ambaŭ ekskursoj estis riĉenhavaj kaj ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj.

Post la solena fermo kaj transdono de la kongresa flago la fama koruso “Interkant” prezentis tre interesan spektaklon pri la opero *Karmen* sub la gvido de Franjo Lévêque.

La postkongresa ekskurso kondukis nin al *Pauillac* (Pojako), kie ni iom aventureme enŝipiĝis por atingi la insuleton *Patiras* (Patiraso). Tie ni ekologie tagmanĝis laŭ ne kutima maniero - sen manĝilaro. (Tiamaniere estas ŝparata 40 litroj da akvo por persono). Ĉio bongustis. Al bonhumoro kontribuis Kajto.

Konklude: ambaŭ kongresoj estis tre sukcesaj kaj oni havis okazon ekkoni novajn samideanojn. Alia pozitiva afero estas, ke kelkaj esperantistoj membriĝis ĉe IFEF kaj estis akceptita nova landa fervojista asocio en Kubo. Pro tre alloga prezento fare de italoj kelkaj entuziasmoj (ne fervojistoj) jam aliĝis al la venonta IFEF-kongreso okazonta en la itala urbeto *San Benedetto del Tronto* situanta 300 km sude de *Bologna*. Aliĝu ankaŭ vi, ĉar la italoj garantias belan sunan veteron kaj buntan programon!

Ni ĝuis tre agrablan semajnon enhavantan riĉan programon, interesajn kulturajn programerojn sukcesplene preparitajn de lokaj geesperantistoj. Grandan dankon al ili.





# La 65-a IFEF-KONGRESO Liba Gabalda

Venezuela Esperanto-Asocio



INTERNACIAJ KONGRESOJ  
de FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ

1909	1910	1911	1912	1913	1914
1915	1916	1917	1918	1919	1920
1921	1922	1923	1924	1925	1926
1927	1928	1929	1930	1931	1932
1933	1934	1935	1936	1937	1938
1939	1940	1941	1942	1943	1944
1945	1946	1947	1948	1949	1950
1951	1952	1953	1954	1955	1956
1957	1958	1959	1960	1961	1962
1963	1964	1965	1966	1967	1968
1969	1970	1971	1972	1973	1974
1975	1976	1977	1978	1979	1980
1981	1982	1983	1984	1985	1986
1987	1988	1989	1990	1991	1992
1993	1994	1995	1996	1997	1998
1999	2000	2001	2002	2003	2004
2005	2006	2007	2008	2009	2010
2011	2012	2013	2014	2015	2016

## La 65-a IFEF-KONGRESO en ARTIGUES cte BORDOZO



4a -11a Majo 2013



La bordozaĵ maskeronoj



En mia trajno - Zuf!  
mi rapidegas tra la land!  
Kaj la sonojn de la maŝino  
superbrivas mia kant!  
Ĝun semajnon - Zuf!  
vendrede tuj post la labor!  
Mi vekas la lokomotivon  
kaj baldaŭ poste mi iras for



Fajfu, jen la vivo !







## **NOVJARA MESAĜO: TAMEN ANTAŬEN!**

**Johano Negrete**

Karaj geamikoj de la internacia komunumo de Esperanto:

Denove jarfino kaj novjaro kaj ni devas daŭrigi la marŝon kun nia libere akceptita kaj amata lingvo Esperanto. Estas supozeble, ke nia mesaĝo estu pli malpli simila al tiuj de lastaj jaroj. La terĝlobo turniĝas, sed tamen neniam revenas al la sama punkto. Fakte ĉiu-jare ni estas unu jaro malsimilaj, unu jaro pli diversaj. Ni konsumas tempon; ĉi-sence kaj domaĝe ĝi estas ne renovigebla riĉofonto. Oni ne povas renovigi la tempon kiam ĝi elĉerpiĝis. Ni ricevis je la naskiĝo nian tempo-porcion. Tio, kion la antikvaj grekoj nomis la Moira (= la porcio) kaj aliaj plipatose la Fato. Pro tio nia mesaĝo ĉi-jare ne intencas simili al la de lastaj jaroj.

Ekzemple, ni ne deziras nur diri "Feliĉan Novan Jaron 2013" kun aliaj pli ornamaĵoj, eĉ se tio estas neforigebla. Ni ŝatas ankaŭ konsideri vin kiel grava parto de nia vivo, ĉar ni taksas vin kiel akompananto de nia vivo, de nia tempo, de nia vojo, de niaj cirkonstancoj. Ni povintus naskiĝi en malsimilaj jarcentoj kaj ne koincidi nek en historia tempo nek en civizacio. Multe malpli koincidi en la lingvo Esperanto. Tamen kaj bonŝance la Sorto volis kunigi nin esperantistoj de ĉiu parto de la mondo aŭ al la amikoj de la lingvo kaj de la projekto "Unu mondo pli demokratia kaj pli solidara per komuna interlingvo" en la sama tempolinio kaj en la sama "globa civilizacio". Tio bonŝancas.

Eblas ke multaj esperantistoj ne trovas nuntempe, ke la "sonĝo de l' homaro", la "brilo de la verda stelo" aŭ la "fina venko" estas realigeblaj ideoj, kiuj povas iam allogi al la grandaj plimulto de landoj kaj kontinentoj; ke tiaj ideoj estas vere praktikeblaj aŭ male nur utopioj en la negativa senco de la pura fantazio sendependa. Povas esti, ke tiuj esperantistoj, kvankam ĝuas kaj uzas nian lingvon, perdis tamen la esperon je kreskado kaj ekspansio.

Laŭ la historio de nia lingvo kaj movado kelkfoje oni perdis aŭ malkreskis en iu ajn lando kaj samtempe oni kreskis en alia. Kiam la movado falis en Rusio, tamen baldaŭ la centro de aktivado turniĝis al Francio. Poste Hungario reprenis la verdan flagon kaj impulsis la esperantan komunumon. Sed ni havas plurajn dimensiojn en nia ĉiutaga vivo, du el ili tiom gravaj: la loka kaj la globa dimensioj. Kaj ĉiu esperantisto havas la konsciencon, la grandan konsciencon, de ke sia vivo disvolviĝas en du

dimensiojn: loka kaj globo. Li devas funkcii en ambaŭ direktoj kaj harmonigi ambaŭ mensurojn de sia vivo. Oni devas interesiĝi pri la lokaj aferoj de sia vilaĝo, urbo kaj nacia lando, kaj samtempe pri internaciaj eventoj, kiuj okazas en ceteraj landoj. Oni devas kombini la malgrandon kun la granda. Tio estas la responso de ĉiu esperantista kaj sia privata heroaĵo. Ne ekzistas -aŭ almenaŭ ne devas ekzisti- naciaj esperantistoj, kiuj blindiĝas al internaciaj aferoj, kvankam naziaj esperantistoj grave vundis la ekzistadon de nia verda movado dum la Germana Tria Regno.

Tiele, kiam la ŝanco por Esperanto falas en iu ajn lando kaj oni perdas la progreson de nia afero, ne forgesu, ke samtempe en alia parto de la mondo estas fonditaj novaj esperanta gazeto, klubo aŭ kurso. Ne forgesu, ke ni apartenas al internacia komunumo, jen Esperantujo jen Esperantio. Niaj solidaraj ligiloj venas el la lingvo kaj el unu granda kaj belanima personeco kiel Zamenhof. Iusence li estis nia "Liberiginto" fronte al la diskriminaciaj lingvaj ĉenoj de la internacia scenejo; li pligrandigis nian lingvan konscion, li estis kiel nia Moŝeo malferminte la akvojn de la Ruĝa Maro. por eskapi al la tereno de internacia neŭtrala lingvo.

Do, en Venezuelo oni ne scias kio povas okazi. Se nuntempe la landa asocio ne havas tiun impeton, propra de nia pasinteco, kaj se la forto malfortiĝas en ĝi aŭ kelkaj esperantistoj ne kontribuas finance nek agade sendube la karakterizo de nia epoko, la interreto, grave incidas la rilatojn inter esperantistoj tiam neniam perdu la esperon, eĉ se ni sentas, ke ni estas en la rezistado. Oni ne devas profeti, ĉar neniu povas antaŭvidi kio okazos. "Interterpe ni plu vivadas en nia lingva komunumo kaj fosas nian sulkon" (W. Auld). La komunumo havas alian dimension kaj povas kreski alilande kaj globo. Kuraĝu! Ĉiam aliaj reprenas la flagon, kaj eblas, ke ĉi tie nova generacio de aktivaj kaj saĝaj esperantistoj povus aperi. Pro tio, ni diru "tamen antaŭen!". Nia kaŭzo estas nobla kaj ni utilas por la bona vojo de la homaro.

Juan Negrete  
Prezidanto de VEA